Jaro III/VII. 3 N-o (27) Decembro 1925

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
Fondita en 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO:

Sao: La verda kaj ruĝa steloj. — *Jack London:* La neevitebla blankulo. — *J. Norkus:* Ni kaj la mondo. En la mondo de libroj. Trad. *M. M.* — *G. Demidjuk:* Kion rakontas la ĉielskrapantaj gigantoj? — *J. Milonov:* Scienco kaj Tekniko.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Rezulte de niaj alvokoj pri alsendo de materialo por la orienta numero, ni sukcesis kolekti kunlaboraĵojn laŭ sia suma amplekso superantajn la grandecon de niaj kajeroj. La hodiaŭan numeron ni do malgrandigas je kelkaj paĝoj por aldoni rekompence ilin al la januara, orienta numero.

Ĝi estos jam la tria specialtema numero, de ni aperigata, kaj la ĝenerala aprobo, kiun renkontis la unuaj du numeroj, ebligas al ni fari kelkajn konkludojn.

Kion ordinare prezentas esperantistaj gazetoj? Kiamaniere efektiviĝas kunlaborado en ili kaj ilia redaktado? Ne estas iu sekreto, ke, estante malriĉaj, esperantistaj gazetoj ne pagas honorarion al siaj kunlaborantoj kaj en ili kunlaboras do volontuloj, inspirataj de certa flamiĝo, ardiĝo al Esperanto. La volontuloj ne estas malmultaj kaj manuskriptoj ne mankas sur la redakta tablo; pli ofte ili eĉ superfluas. Kaj jen la redaktoroj, kiuj ne havas eblon mendi ĉe aŭtoroj necesajn novelojn, rakontojn aŭ artikolojn, elektas el la amaso da venantaj manuskriptoj tion, kio al ili plaĉas aŭ kio konvenas al la spirito, al la ideologio de la redaktata gazeto. Ĉio cetera trafas korbon.

Atentu; — kiom da laboro estas farata superflue? kiom da tempo estas perdata por vekado aŭ tradukado? kiom da mono estas elspezata por afranko de tiuj manuskriptoj, kiuj finfine trafas redaktan korbon? Ĉu tio ne estas la kaoso, propra al la kapitalisma sistemo? Certe, estas nome ĝi, kvankam forestas elemento de konkurado pro la mona honorario; ĝin anstataŭas elemento de konkurado pro certagrada ambicio, deziro konigi sian nomon per la gazeto, iagrade famiĝi.

Sed ĉu nia revuo ne uzas la samajn metodojn? Ni ja ankaŭ komencis per la manuskriptoj, senditaj al ni proprainiciate de niaj k-doj. Kaj tamen la procento de la manuskriptoj, kiuj ĉe ni trafas la korbon, estas multe malpli granda, ĉar la ideo socia, unuiganta nin en SAT, samdirektigas ĉiujn niajn penojn al certa direkto. Nia redakta tasko estas multe pli facila, ĉar nin gvidas en nia laboro ne nia persona plaĉo, ne la personaj gustoj de l' redaktantoj, sed la sama idearo, kiu gvidas niajn kamaradojn en ilia kunlaborado en la revuo. Malgraŭ tio la sistemo restas sistemo kaj la elementoj de kaoso, kvankam en malpli multa grado, estas propraj al nia laboro super la revuo.

LA VERDA KAJ RUĜA STELOJ

SAO

Proleta esperantistar'
Nun ekbatalas ĝoje.
La lingvon helpan nia far'
Akcelu ĉiufoje.
Forigu do per Esperant'
La limojn ni de ĉiu land'.
Dum densa la malhelo
Vivu la verda stelo!

Sed ne per verda stelo nur
Foriĝos suprem-ago:
Briladas ruĝa stelo sur
Batala nia flago.
Ektanos laboruloj
En ĉiuj ter-anguloj
Ekspluatistan felon,
Ruĝan tenante stelon.

Propriĝu tuta vasta mond'
Al aro pruduktanta!
Popolojn interligu pont'
De l' lingvo Esperanta!
Ekspluatistojn venkos ni!
Senklasa venos la soci'!
Nin gvidas al ĉi-celoj
Verda kaj ruĝa steloj.

LA NEEVITEBLA BLANKULO

JACK LONDON

— La nigruloj neniam komprenos la blankulojn, nek la blankuloj la nigrulojn tiom longe, kiom nigro restos nigro kaj blanko restos blanko.

Tiel diris kapitano Woodward. Ni estis sidantaj en salono de Charlay-Roberts'a gastejo en Apia, drinkante longajn Abu-Hamed'ojn, kiuj estis kunmiksataj kaj kunkonsumataj de la antaŭmenciita Charley Roberts, pretendinta, ke li ricevis la recepton rekte de Stevens, eminenta pro la elpenso de Abu Hamed, kiam li estis instigata per Nilsoifo, tiu Stevens, kiu estas responda por "Kun Kitchener al Khartoun" kaj kiu estis mortigita ĉe la sieĝo de Ladysmith.

Kapitano Woodward, malalta kaj dikkorpa, maljuneta, brulumita per kvardek jaroj da tropika suno, kaj kun la plej belaj fluide-brunaj okuloj, kiujn mi iam ajn vidis en la vivo, parolis el sia ampleksa travivitaĵ-sperteco. La interkruciĝantaj cikatroj sur lia senhara verto kvazaŭ rakontis pri batalhakila intimeco kun nigruloj, samegalan intimecon montris reklamo sur la dekstra flanko de lia kolo, kie sago foje en-

penetris kaj estis tuj eltirita. Kiel li klarigis, li estis tiufoje rapidema — la sago malhelpis lian kuradon — kaj li sentis, ke li ne povis eluzi la tempon por forrompi la sagokapon kaj eltiri la sagon sammaniere kiel ĝi eniris. Nune li estis estro de "Savaii", la granda vaporŝipo, kiu varbadis laborulojn el la Okcidento por la germanaj plantejoj en Samoa.

— Granda parto de ĉagreno ekzistas pro la malsaĝeco de blankuloj, — diris Roberts, paŭzante por longedaŭra engluto el sia glaso kaj por malbeni per amemaj terminoj la Samoa'an kelneron. — Se la blankulo penus iomgrade ekkompreni la funkciadon de la nigrula menso, la plimulto de la ĝenaĵoj estus evitebla.

— Mi vidis kelkajn, kiuj asertis, ke ili komprenis la finigrulojn, — kapitano Woodward rebatis, — kaj mi ĉiam rimarkis, ke ili estis la unuaj, kiuj estis "kai-kai'itaj" (manĝitaj). Ekmemoru la misiistojn en Nova-Guinea kaj en Nov-Hebridoj — la martira insulo de Erromanga — kaj ĉiujn aliajn. Ekmemoru pri la aŭstria ekspedicio, kiu estis dispecigita en la densejo de Guadalcavar. Kaj ekmemoru pri la negocistoj mem, kiuj havis multjaran spertecon kaj kiuj fanfaronis, ke neniu finigrulo prenus ilin, sed iliaj kapoj ĝis hodiaŭa tago ornamas la trabojn de la kanot-domoj. Estis maljuna Johano Simons — dudek ses jarojn li travivis en la sovaĝaj randoj de Melanesia; li ĵuradis, ke li konis la nigrulaĉojn kiel libron kaj ke ili neniam korp-difektos lin, kaj li estis disponita ĉe Marovo-laguno, Nova Georgia, lia kapo estis forsegita de nigra Maria kaj maljuna finigrulo; kiu havis nur unu kruron, la alian li lasis en la faŭko de ŝarko, dum li estis subakviĝanta por suprenlevi dinamititajn fiŝojn. Estis ankaŭ Billy (Vilĉjo) Watts, kun terura reputacio kiel nigrulaĉ-mortiganto, homo, kiu povis ektimigi diablon. Mi memoras, restadante ĉe Malgranda Promontoro, Nova Irlando — vi scias, kiam la finigruloj ŝtelis duonon da kesto kun tabako — tio kostis al li pli-malpli tri kaj duonon da dolaroj. Reciproke li elbridiĝis, mortpafis ses nigrulaĉojn, frakasis iliajn militkanotojn kaj bruligis du vilaĝojn. Ankaŭ okazis ĉe Malgranda Promontoro, kvar jarojn poste, ke li estis atakita de kvindek Buku-knaboj [1]), kiuj estis kun li fiŝkaptantaj beŝdemerojn [2]). En daŭro de kvin minutoj ili ĉiuj estis mortintaj, kun escepto de tri knaboj, kiuj elliberiĝis en kanoto. Ne parolu al mi pri kompreneco de la finigruloj. La misio de la blankulo estas "farmadi" la mondon, kaj tiu ĉi tasko estas sufiĉe granda por li. Aliokaze, kiom da tempo restas al li por kompreni la finigrulojn?

— Ĝuste tiel, — diris Roberts. — Kaj iel, konsiderante ĉion, ŝajnas al mi, ke ne estas necese kompreni nigrulojn. Laŭ rekta proporcio al la malsaĝeco de blankulo estas lia sukceso je "farmado" de la mondo . . .

---

1) Plenaĝuloj, sed ne maljunuloj en Sandviĉ-insuloj (Trad.).
2) Bêche-de-mer — (franc., angl.) — speco de sudmaraj fiŝoj (Trad.).

— Kaj kulturi la timon al Dio en la korojn de finigruloj, — kapitano Woodward senpripense ekdiris. — Eble vi estas prava, Roberts. Eble estas lia malsaĝeco, kiu sukcesigas lin, kaj kompreneble unu fazo de lia malsaĝeco estas lia senpoveco ekkompreni la finigrulojn. Sed jen kio estas certa, la blankuloj devas mastrumi la finigrularon, ĉu ili komprenas ilin aŭ ne. Tio estas neevitebla. Tia estas la sorto.

— Kaj kompreneble la blankuloj estas neeviteblaj — tia estas la sorto de la nigruloj, — Roberts interrompis. — Diru al la blankulo, ke estas perlokonkoj en iu laguno, ensvarmata de dek mil da kriegantaj kanibaloj, kaj li celos tien tute sola, kun duondekduo da kanakoj [1]) — subakviĝantoj kaj kun stana vekhorloĝo kiel kronometro, ĉio enpakita kvazaŭ sardinoj en malvasta kvintuna keĉo [2]). Oni ekflustru, ke oro estas trovita en Norda Poluso, kaj la sama neevitebla blankhaŭta kreaĵo tuj ekvojaĝos, armita per pikilo kaj fosilo, kun flankaĵo da lardo kaj kun lastmoda apogseĝo — kaj ne nur tio, sed li vere atingos tien. Sciigu al li, ke estas diamantoj sur la ruĝvarmegaj remparoj de infero — kaj sinjoro Blankulo atakos la remparojn kaj devigos maljunan Satanon mem al perpikila kaj fosila laboro. Jen la rezulto de stato malsaĝeca kaj neevitebleca.

— Sed mi scivolemas, kion la nigruloj devas pensi pri la . . . la neevitebleco, — mi diris.

Kapitano Woodward mallaŭte ekridis. Liaj okuloj rememoreme eklumetis.

— Mi ankaŭ scivolemas, kion la finigruloj de Malu pensis kaj ankoraŭ pensas pri unu blankulo, kiun ni havis surborde, kiam ni vizitis ilin en Duchess, — li elparolis.

Roberts kunmiksis tri pluajn Abu-Hamed'ojn.

— Tio okazis antaŭ dudek jaroj. Sakstorp estis lia nomo. Li estis certe la plej stulta homo, kiun mi iam ajn vidis, sed li estis tiel neevitebla kiel morto. Estis nur unu afero, kiun tiu kunulo scipovis, kaj tio estis pafi. Mi memoras la unuan fojon, kiam mi renkontis lin — ĝuste ĉi-tie en Apia, antaŭ dudek jaroj. Tio okazis antaŭ via tempo, Roberts. Mi estis dormanta en Dutch-Henry'a hotelo, malsupre, kie la vendistaro estas nun. Ĉu vi iam ajn aŭdis pri li? Li kungajnis respektindan monsumon, kontrabandante armilojn por la ribeluloj, forvendis sian hotelon kaj estis mortigita en Sidney nur ses monatojn poste en drinkeja disputo.

Sed Sakstorp. Foje mi ĵus endormiĝis, kiam du katoj en la korto komencis kanti. Mi elsaltis el la lito kaj prenante kruĉon kun akvo iris al la fenestro. Sed ĝuste tiam mi aŭdis, ke la fenestro de proksima ĉambro estis suprenlevita. Du pafoj estis ekpafitaj kaj la fenestro fermiĝis. Mi ne povas impresi vin je la rapideco de la okazintaĵo.

---

[1]) Kanaka — indiĝeno de Sandviĉ-insuloj (Trad.).

[2]) Ketch — (angl., verŝajne prenita el turka, kompar. franc. caïque) — preskaŭ ne plu uzata speco de ŝipo kun ĉefa kaj posta masto.

Dek sekundojn eble. Supreniĝis la fenestro, beng-beng ekaŭdiĝis la revolverpafoj, kaj la fenestro remalsupreniĝis. Kiu ajn li estis, li eĉ ne atendis por vidi la efekton de siaj pafoj. Li sciis. Ĉu vi sekvas min? — li *sciis*. Ne plu aŭdiĝis katkoncerto, kaj matene kuŝis tie la du ofendituloj ŝtonmortintaj. Tio mirigis min. Ĝi ankoraŭ nun ŝajnas al mi kiel mirindaĵo. Unue, estis stelnokto, kaj Sakstorp pafadis necelante; due, li ekpafis tiel rapide, ke la du ekbruoj aŭdiĝis kvazaŭ duobla ekbruo; kaj fine, li sciis, ke li trafis sian celon, sen rigardo por vidi.

Du tagojn poste li venis sur la ŝipon por vidi min. Mi estis tiam subestro sur "Duchess", granda cent-kvindek-tuna skuno, merlulo[1]). Kaj permesu min diri al vi, ke la merluloj dum tiuj tempoj estis merluloj. Ekzistis nek registaraj inspektistoj, nek registaraj protektadoj por ni. La laboro estis maldelikata, donu kaj prenu, se ni sukcesis, nenio estis malhelpata, kaj ni transportadis finigrulojn de ĉiu ajn sud-mara insulo, el kiu oni ne elĵetis nin. Nu, Sakstorp venis sur la ŝipon, Johano Sakstorp estis la nomo, kiun li donis. Li estis sablokolora hometo, la haroj sablokoloraj, la vizaĝkoloro sabla, kaj la okuloj ankaŭ sablokoloraj. Nenio okulfrapanta je li. Lia animo estis tiel neŭtrala, kiel lia kolorskemo. Li konfesis, ke li estis senhava kaj ke li deziras akiri pozicion surŝipe. Li kunirus kiel kajutknabo, kuiristo, ŝarĝozorganto aŭ ordinara ŝipano. Li scipovis nenion pri la menciitaj fakoj, sed diris, ke li estis dezirema lerni. Mi ne volis lin, sed lia pafado tiel impresis min, ke mi akceptis lin kiel ordinaran ŝipanon, kun salajro tri sterlingojn monate.

Li certe estis volanta lerni, tion mi devas konfesi. Sed pro sia ecaro li povis lerni nenion. Li ne pli bone komprenis la kompascitadon, ol mi povus kunmiksi drinkaĵon, kiel Roberts ĉi-tie. Kaj koncernante direktilon, li havigis al mi miajn unuajn grizharojn. Mi neniam kuraĝis fidi al li la direktilon, kiam ni estis vojaĝantaj sur oceano, dum plene kaj proksime estis nesolveblaj misteraĵoj. Li neniam povis vidi diferencon inter ŝnurego aŭ ŝnuraro, simple li ne povis. La antaŭparta triangul-velo kaj ĵibo estis egalaj al li. Diru al li, ke li malstreĉu la ĉefŝnuregon, kaj ankaŭ vi ekscius: li faligus la ankron. Trifoje li falis en akvon kaj li ne povis naĝi. Sed li ĉiam estis gajema, neniam marmalsana kaj li estis la plej komplezema homo, kian mi iam ajn konis. Li posedis malkomunikeman animon. Neniam li parolis pri si. Liaj travivaĵoj kvazaŭ komenciĝis la tagon, kiam li dungiĝis sur "Duchess". Kie li lernis pafi, nur la steloj scias. Li estis Jenkio[2]) — tion mi eksciis pro lia parolnuanco. Kaj tio estis ĉio, kion mi iam ajn eksciis.

---

[1]) Blackbird — (angl.) — merlo (nigra birdo). Blackbirder — ŝipo por kapti nigrulojn aŭ polinezianojn por ensklavigo (Trad.).

[3]) Yankee — (angl.) — usona aŭtoĥtono, devenanto de la unuaj anglaj kolonianoj, kiuj enmigris la "New England"-ŝtatojn (Trad.).

Kaj nun mi komencas la historieton. Ni havis malbonfeliĉon en Novaj Hebridoj ricevi nur dekkvar knabojn dum kvin semajnoj, kaj antaŭ la sudorienta vento ni estis proksimiĝantaj al Salomon-insuloj. Malaita estis tiam, kiel ĝi nun estas, bona varb-loko, kaj ni alvenis Malu'n ĉe la nordokcidenta angulo. Tie estas borda rifo kaj ekstera rifo, kaj tre danĝera ankrejo; sed ni atingis la celon sufiĉe facile, kaj ni eksplodigis nian dinamiton kiel signalo al la finigruloj por ke ili alvenu kaj estu varbotaj. Dum tri tagoj ni eĉ ne ricevis unu knabon. La nigrulaĉoj venis al ni — centoj da ili, sed ili nur ridadis, kiam ni montris al ili rozariojn, kalikoton kaj hakiletojn, kaj kiam ni parolis pri la ĝojoj de planteja laboro en Samoa.

La kvaran tagon, tamen, ĉio ŝanĝiĝis. Pli-malpli kvindeko da knaboj enskribiĝis kaj ili estis enloĝigitaj en la ĉef-holdo, kaj kompreneble al ili estis donita la liberuzo de la ferdeko. Kaj kompreneble, postenrigardante, tiu amasa enskribiĝo estis suspektinda, sed tiutempe mi pensis, ke iu potenca ĉefo flankentiris la malpermeson kontraŭ varbado. La matenon de la kvina tago niaj du boatoj alterbordiĝis, kiel kutime — unu por ŝirmi la alian, vi komprenas, en okazo de maltrankvilaĵo. Kaj kiel kutime, la kvindek finigruloj estis sur ferdeko, mallaborantaj, parolantaj, fumantaj kaj dormantaj. Sakstorp kaj mi, kun kvar aliaj ŝipanoj estis la solaj, kiuj restis surborde. La du boatoj estis remataj de Gilbert-insulanoj. En unu estis la kapitano, la ŝarĝozorganto kaj la varbisto. En la alia, kiu estis la ŝirma boato kaj kiu kuŝis cent jardojn for de la marbordo, estis la dua subestro. Ambaŭ boatoj estis bone armitaj, kvankam maltrankvilaĵo estis apenaŭ atendata.

Kvar el la maristoj, inkluzive Sakstorp, estis skrapantaj la malantaŭan ringegon. La kvina maristo, kun karabeno en mano, estis gardestaranta ĉe la akvujo ĝuste antaŭ la ĉefmasto. Mi estis antaŭe, finanta la novan fiŝ-surbordigilon. Ĝuste kiam mi estis etendanta mian manon por preni mian pipon, min aŭdis ekpafon de la terbordo. Mi suprenstreĉiĝis por rigardi. Jo frapis min sur la poston de mia kapo, duonŝtonigante min kaj faligante min ferdeken. Mia unua penso estis, ke io supre forŝiriĝis; sed eĉ kiam mi estis falanta kaj antaŭ ol mi frapis la ferdekon, mi aŭdis la diablan resonadon de pafiloj el la boatoj, kaj tordiĝinte flanken, mi ekvidis la mariston, kiu estis gardestaranta. Du grandaj finigruloj estis tenantaj liajn brakojn, kaj la tria finigrulo, de malantaŭe, estis cerbelŝpruciganta lin per hakileto.

Mi povas vidi ĝin nun, la akvujon, la ĉefmaston, la homareton, kiu estis svarmumanta ĉirkaŭ la maristo, la hakileton, kiu estis faletanta sur la poston de lia kapo, kaj ĉio tio sub la flameganta sunlumo. Mi estis ravita per tiu kreskanta mortvizio. La hakileto ŝajnis timige kaj longe superpendi, antaŭ ol ĝi faletis. Mi vidis ĝin faleti, kaj la kruroj de la homo fleksiĝis sub li kaj li ĉifiĝis. La nigrularoj perforte subtenis lin, dum li estis kelkfoje plu hakita. Tiam mi ricevis du hakojn plu sur la kapon kaj decidis, ke mi estis mortinta. Ankaŭ

la bruto, kiu hakadis min, pensis tiel. Mi estis tro senpova por ke mi povu movi, kaj mi kuŝis tie kaj observis, kiel ili forigis la kapon de la gardostarinto. Mi devas konfesi, ke ili faris ĝin sufiĉe lerte. Ili estis malnovaj spertuloj je la afero.

La karabenpafado el la boatoj ne plu aŭdiĝis, kaj mi ne dubis, ke ĉio finis. Povis esti nur kelkmomentoj, kiam ili estus returniĝontaj por mia kapo. Evidente, ili estis forprenantaj la kapojn de la ŝipanoj, kiuj estis sur la postparto. Kapoj estas multvaloraj en Malaita, precipe blankaj kapoj. Ili ĝuas la honorspacojn en la kanot-domoj de la salakva indiĝenaro. Kian specialan dekoraci-efekton gajnas de tiuj kapoj la densej-loĝantoj, mi ne scias, sed ili ŝatas ilin egalavide, kiel la salakva anaro. Malklare mi ekpensis pri kaŝiĝo kaj mi rampis surmane kaj surgenue al la levturnilo, kie mi sukcesis suprentreni min. De tie mi povis rigardi posten kaj vidi tri kapojn sur la supro de la kajuto — la kapojn de tri ŝipanoj, al kiuj dum tri monatoj mi estis donanta ordonojn. La nigrulaĉoj vidis min staranta kaj ekpaŝis miaflanken. Mi manetendis por mia revolvero kaj trovis, ke ili forprenis ĝin. Mi ne povas diri, ke mi ektimiĝis. Kelkfoje mi estis proksima al morto, sed neniam ĝi ŝajnis esti pli facila, ol tiam. Mi estis duonŝtoniĝinta, kaj ŝajnis al mi, ke nenio gravis.

La gvidanta nigrulaĉo armis sin per viandhakilo el la ŝipkuirejo, kaj li grimacis, kiel simio, dum li prepariĝis por dishaki min. Sed la hakado neniam realiĝis. Kvazaŭ mortmaso li falis ferdeken, kaj mi vidis la sangon, kiu elŝprucis el lia buŝo. Kvazaŭ en sonĝo mi aŭdis karaben-ekpafon kaj daŭrigon de pafado. Nigrulaĉo post nigrulaĉo falis. Miaj sentoj ekklariĝis, kaj mi rimarkis, ke neniam okazis maltrafo. Ĉiufoje, kiam tiu karabeno estis ekpafita, falis nigrulaĉo. Mi sidiĝis sur ferdeko apud la levturnilo kaj suprenrigardis. Sur la breto, kiu supre estis subtenanta la mastojn, sidis Sakstorp. Kiel li sukcesis fari tion, mi ne povas imagi, ĉar li suprenportis kun si du Vinĉester-karabenojn kaj, mi ne scias, kiom da bandolieroj[1]) de municio; kaj nun li restis faranta unu solan aferon en tiu ĉi mondo, por kiu li estis taŭga.

Ofte mi vidis pafadon kaj buĉadon, sed mi neniam vidis ion similan al tiu. Mi sidis apud la levturnilo kaj rigardis la spektaklon. Mi estis malforta kaj svenema, kaj ĉio tio ŝajnis al mi kvazaŭ sonĝo. Beng, beng, beng, beng — sonadis la karabeno, kaj tod, tod, tod, tod — faladis la nigrulaĉoj al la ferdeko. Estis miregige vidi ilin faladi. Post ilia unua atako por mortigi min, kiam pli-malpli dekduo da ili falis, ili estis kvazaŭ paralizitaj; sed li neniam ĉesis elpumpadi sian pafilon. Je tiu tempo kanotoj kaj la du boatoj alremis de la terbordo, armitaj per Snajder- kaj Vinĉester-karabenoj, kiujn ili kaptis en la boatoj. La pafado, kiun ili komencis kontraŭ Sakstorp, estis grandega. Feliĉe por li la nigrulaĉoj estas nur bonaj ĉe proksima paflimo. Ili ne kutimas

---

[1]) Municiportilo — (franc. bandolière, ital. bandoliero). *(Trad.)*

meti la pafilojn al siaj ŝultroj. Ili atendas, ĝis ili estas ĝuste apud siaj celoj, kaj tiam ili ekpafadas de la koksoj. Kiam unu karabeno trovarmegiĝis, Sakstorp prenis la alian. Tia estis lia ideo, kiam li kunportis du karabenojn.

Miriga afero estis la rapideco de lia pafado. Ankaŭ, li neniam maltrafis. Se iam ajn io ajn estis neevitebla, tiu homo estis tio. Estis la rapideco, kio faris la buĉadon tiel timigega. La nigrulaĉoj ne havis tempon por pensi. Kiam ili sukcesis pensi, ili atakeme alboatiĝis, kompreneble renversante siajn kanotojn. Sakstorp neniam haltis. La akvo estis kovrita per ili, kaj plump, plump, plump — li venigis siajn kuglojn en ilin. Eĉ ne unu maltrafo, kaj mi povis klare aŭdi la batbruon de ĉiu kuglo, kiam ĝi enkarniĝis.

La nigrulaĉoj disiĝis kaj naĝante celis terbordon. La akvo estis tapiŝita per balanciĝantaj kapoj, kaj mi ekstaris, kvazaŭ en sonĝo, kaj rigardis ĉion tion — la balanciĝantajn kapojn kaj la kapojn, kiuj ĉesis balanciĝi. Iuj el la longdistancaj pafoj estis belegaj. Nur unu homo atingis la marbordon, sed tuj kiam li ekstaris por vadi teren, Sakstorp ĉesigis lin. Tio estis grandioza. Kaj kiam du nigrulaĉoj malsuprenkuris por treni lin el la akvo, Sakstorp trafis ilin ankaŭ.

Mi pensis, ke tiam ĉio forpasis, kiam mi aŭdis la karabenon denove. Nigrulaĉo elvenis el kajutelirejo, kurante al la ringego, kaj li falis, antaŭ ol li ĝin alingis. Ŝajnis, ke la kajuto estis plenigita per ili. Mi kalkulis dudek. Ili suprenvenis po unu kaj saltis al la ringego. Sed ili neniam atingis ĝin. La spektaklo rememorigis min pri kaptilpafado. Nigra korpo elmontriĝus el la elirejo, beng — ekaŭdiĝus la karabeno de Sakstorp, kaj malsuprenfalus la nigra korpo. Kompreneble, ti-kiuj estis malsupre, ne sciis, kio estis okazanta sur la ferdeko, tial ili daŭrigis ekmontriĝi, ĝis la lasta estis finita.

Sakstorp atendis kelkminutojn, por certiĝi, kaj malsuprenvenis sur la ferdekon. Li kaj mi estis la solaj, kiuj restis de la "Duchess"-a tuto, kaj mi estis preskaŭ tute malutiligita, dum li estis malutila post kiam la pafado ĉesis. Sub mia estreco li lavis miajn kranivundojn kaj kunkudris ilin. Granda glaso da viskio energiigis min al peno por forvojaĝi. Nenio alia estis farebla. Ĉiuj aliaj estis mortintaj. Ni penis suprenlevi la velojn, dum Sakstorp estis levanta kaj tenanta la kurbilon. Denove li estis stulta tervagulo. Lia levado eĉ ne cendon valoris, kaj kiam mi svenis, ĉio ŝajnis esti finita.

Kiam mi reviviĝis, Sakstorp estis maldecideme sidanta sur la ringego, atendante por demandi min, kion li faru. Mi ordonis al li traesplori la vunditojn kaj eltrovi, ĉu estas iuj, kiuj ankoraŭ povas rampi. Li elkolektis ses. Unu, mi memoras, havis rompitan kruron, sed Sakstorp diris, ke liaj brakoj ne estis difektitaj. Mi kuŝis en la ombraĵo, forfrotante la muŝojn kaj direktante la laboron, dum Sakstorp estis mastrumanta sian hospital-anaron. Estu mi benita, se li ne devigis tiujn kompatindajn nigrulaĉojn levi ĉiun ŝnuregon de la levilaro, antaŭ

ol li trovis la vellevilon. Unu el ili lasis la ŝnuregon dum ŝarĝlevado kaj falis ferdeken mortinta, sed Sakstorp batis la aliajn kaj devigis ilin al laboro. Kiam la antaŭa kaj la ĉefa veloj estis suprenigitaj, mi ordonis, ke li elfrapu la katenon el la ankra ĉeno kaj funkciigu ĝin. Mi estis helpita poste je la "rado", kie mi estis provonta funkciigi la direktilon. Mi ne povas diveni, kiel li ĝin faris, sed anstataŭ elfrapi la katenon, malsupren venis la dua ankro, kaj jen ni estis duoble alligitaj.

Finfine li sukcesis elfrapi la ambaŭ katenojn kaj levi la ligitvelon kaj ĵibon, kaj "Duchess" estis vojaĝpreta. Niaj ferdekoj aspektis terure. Mortintaj kaj mortantaj nigrulaĉoj estis ĉie ajn. Multaj el ili estis enkuŝigitaj en la plej neimageblaj lokoj. La kajuto estis plenigita per ili, kien ili enrampis de la ferdeko kaj mortis. Mi ordonis al Sakstorp, ke li kun sia tombulareto levu ilin en la maron, kaj maren ili eniĝis, la mortantoj kaj la mortintoj. La ŝarkoj havis grasan manĝon en tiu tago. Kompreneble, niaj kvar mortigitaj maristoj iris la saman vojon. Iliajn kapojn, tamen, ni enmetis en sakon kun peziloj por tio, ke ili hazarde ne vagu marborden kaj en la manojn de la nigrulaĉoj.

Niajn kvin kaptitojn mi decidis uzi kiel ŝipanaro, sed ili decidis aliel. Ili atendis sian ŝancon kaj ensaltis maron. Sakstorp trafis du en mezaero per sia revolvero, kaj li estus pafinta la aliajn tri, kiuj jam estis en la akvo, se mi ne estus haltiginta lin. Mi malsanis pro la buĉado, vi komprenas, kaj krome, ili helpis funkciigi la skunon. Sed tiu favorkoreco estis vana, ĉar la ŝarkoj havigis al si ilin tri ĉiujn.

Mi havis cerbofebron aŭ ion similan post kiam ni forlasis la landon. Iel "Duchess" kuŝis sencele dum tri semajnoj, kaj poste mi refortiĝis kaj ni ekpuŝis ĝin al Sidney. Iel tiuj nigrulaĉoj de Malu lernis la ĉiaman lecionon, ke ne estas bone ŝerci je blankulo. Je ilia afero Sakstorp estis certe neevitebla. —

Charley Roberts longdaŭre ekfajfis kaj diris:

— Nu, mi certe konsentas tion. Sed kio okazis al Sakstorp?

— Li vagis for kaj fariĝis fokĉasisto — vera spertulo. Dum ses jaroj li estis idolo de ambaŭ, la Viktoria kaj la San-Franciska, ŝiparoj. La sepan jaron lia skuno estis kaptita de rusa krozoŝipo, kaj ĉiuj anoj, oni diras, estis enportitaj en la siberiajn salminejojn. En iu okazo mi neniam plu aŭdis pri li.

— Farmadi la mondon, — Roberts murmuretis: — farmadi la mondon! Nu, mi toastas ilin. Iuj devas fari ĝin — farmadi la mondon, mi intencas.

— Kapitano Woodward frotis la cikatrojn sur sia senhara kapo.

— Mi plenumis mian parton, — li diris. — Kvardek jarojn nun. Tiu estas mia lasta vojaĝo. Kaj poste mi iros hejmen por resti tie.

— Mi vetas la vinon, ke vi ne restos hejme, — Roberts proponis. Vi mortos en la jungaĵo, ne hejme.

— Kapitano Woodward tuj akceptis la veton, sed persone mi opinias, ke Charley Roberts havas la plej bonan ŝancon.

Elangligis *Georgo Saville*, Nov-Jorko.

NI KAJ LA MONDO

J. NORKUS

Kiam la unuan fojon la flama, minaca tondro kraĉis en la neston de la reĝoj, — el niaj pli kaj pli varmaj brustoj eksonis melodia batalkanto, milionojn da laboristoj ĝi ekbruligis al la batalpovo...

Kiam ni atendas la duan, pli grandan, ol la unua, tondron, ke ĝi bruligu kaj krevigu la inferon, — niaj koroj estas granito, en niaj cerboj kaj arterioj ni sentas multajn fulmojn kaj pli larĝan venton...

Kiam pereantaj laboristoj disŝiros la ŝtatan katenon de la dolora sklavejo, — tiam al ili ekbrilos la freŝa suno de la saĝo, en iliaj koroj ekbrulos la amo, en la mondo naskiĝos la freŝa libera vivo.

El litova lingvo trad. *M. Pagiraitis*.

EN LA MONDO DE LIBROJ

Ni vivas ne en nur unu mondo, sed en pluraj. Krom niaj ĉiutagaj ĉirkaŭaĵoj ni kelkfoje migradas en la granda, libera naturo de kiu ni refreŝigite, refortigite povas reveni al nia mallarĝa rondo. Ni ankaŭ konas la mondon de l' sentoj kaj pensoj, por multaj la plej riĉan el ĉiuj.

La mondo de libroj havas ion komunan kun ĉiuj ĉi-tiuj mondoj. Ĝin ni povas demandi pri multo, kion estas bone por ni scii, se ni deziras fari la ĉiutagan laboron en plej bona maniero. Ĝi povas nin gvidi al lokoj en la realo neatingeblaj. Ĝi povas instrui al ni la leĝojn de l' naturo. Ĝi antaŭmetas al ni la grandajn bildojn kaj pensojn, kiuj estas spirita posedaĵo de gento. Kaj de tiuj ekskursoj al malproksimo kaj grando ni povas returni al nia propra eta mondo, ĝin kompreni kiel ĉeneron en pli granda kunmetaĵo, kompreni kiel ĝi en sia modesteco estas submetata al naturleĝo kaj al evoluo de l' gento, kompreni kiel ĝi povas tributi al vivado de la homgento tra la tempoj. Saĝo konsistas ankaŭ en tio, ke oni povas trovi la grandecon meze de l' malgrandeco.

Bona libro povas pliproksimigi nin al la cirkonstancoj de l' vivo per vekado de l' sento por ĉio granda, bela kaj bona.

Legi bonan libron estas kvazaŭ parolado kun bona amiko, kiu portas sciigojn de proksimo kaj malproksimo kaj same kiel ni ŝatas la karakterizan vizaĝon de l' amiko dum li paroladas, ni ankaŭ ŝatas, ke la libro havu belan aspekton.

Kion ni devas legi? Tiu demando dependas de multaj cirkonstancoj — ago, klereco, interesoj ktp., kaj estas neeble respondi kontentige je ĝi. Tamen la jena konsilo por personoj kleremaj estas sekvinda.

Unue ni orientu nin en la mondo, kie ni estas kaj havigu al ni scion pri la mondbildo en tiel klara kaj konkreta ĉeftrajto, kiel eble. Por tio servas la astronomio kies metodoj kaj rezultoj en la lastaj jaroj tute ŝanĝis nian mondkomprenon. Tial estas necese studi la lastajn eltrovaĵojn por bone kompreni la interrilatojn de nia planedo kun la ceteraj astroj en la universo. Tio estu unu el la fundamentaj ŝtonoj, sur kiu ni konstruos nian vivopinion. De l' sennombraj sunoj stelnebuloj kaj planedoj ni returnu la rigardon al nia propra planedo — la tero, kaj per la geologio havigu al ni scion pri ĝia estiĝo kaj evoluo, kaj samtempe akiru scion pri la aĝo de l' homgento.

De geologio ni sekvu la vojon al Biologio, al la instruo pri deveno de l' vivo (sub ĝi ni ankaŭ tuŝu la planon de fiziko kaj kemio). Kaj poste ni observu psikologion, la instruon pri la leĝoj de nia konscienco.

Tiel agante ni proprigas al ni konon pri aro da realaĵoj, kiu havos definitivan signifon por nia pozicio rilate al la fundamentaj vivdemandoj.

Ni iris de ekstere internen, de l' mondspaco al la tero, al la homgento, al kiu ni apartenas, kaj finfine al la vivprincipo kaj al ni mem. Sed ni estas, de nia naskiĝo ĝis morto, ĉeneroj ne nur de homgento, sed ankaŭ de homsocieto, kiu sekvas siajn proprajn leĝojn. Estas tial ankaŭ konsilinde studi kiel tiu societo konstruiĝis. Kaj per sociscio, kiu estas instrufako en niaj lernejoj, ni havigas al ni elementan komprenon pri la formoj, sub kiuj nia popolo tenas sian ĉiutagan vivadon.

Necesege estas studi kulturhistorion, precipe la vivpriskribadon de l' grandaj spiritoj, kiuj gvidis antaŭen la evoluadon.

Belliteraturo estas bona kaj instruriĉa legado. En ĝi ni ricevas bildon de movado kaj ofte ekkomprenas — kio je multaj okazoj movas sin ĉirkaŭ kaj en ni.

Poezio estas la floro de l' verkarto. Ĝi fortigas nin dum nia laboro, ĝi ĝojigas nin dum nia ripozo. La arto de verso estas la plej bona rimedo por densigo de bildo aŭ sento. Unu sola, feliĉe elektita, strofo malfermas tutan mondon al ni, por ni, pri ni kaj en ni.

El la dana lingvo mallongige trad. *M. M.*





Tagmanĝo de konstrulaboristoj sur la alto de dudeka etaĝo

KION RAKONTAS LA ĈIELSKRAPANTAJ GIGANTOJ?

G. DEMIDJUK

Vi certe scias, ke ekzistas multaj urbetoj kaj vilaĝoj, kies loĝantaro ne superas 14—15000 homojn. Sed ĉu vi scias, ke la sama nombro da homoj povas loĝi nur en unu domo?

Kaj tio estas fakto: la plej alta, 56-etaĝa domego en Nov-Jorko havas loĝspacon sufiĉan por 14000 homoj. La suma surfaco de planko en ĉiuj ĝiaj etaĝoj egalas 162000 kv. metrojn, kaj la domego altas 240 metrojn, havante la pezon de 9 milionoj da tunoj.

Eble, tiuj ciferoj ne sufiĉe klare diras al vi pri la grandiozeco de l' konstruaĵo? 9 milionojn da tunoj pezas la konstruaĵo, sekve minimume estis bezonaj 9 tunmilionoj da konstrumaterialoj por tiu ĉi domego kaj por transporti tiun konstrumaterialon estis bezonaj proksimume naŭ mil trajnoj!

Sed ni flankenlasu la ciferojn kaj okupu nin pri tio, kiamaniere estas konstruataj tiaj gigantoj, kion interesan havas la tekniko de ilia konstruado.


Se ni provus konstrui tian domegon, kiel ordinare, el brikoj, ni ekonomie malsukcesus: jam la domo alta 10—12 etaĝojn postulus, ke la muroj en sia malsupra parto estu dikaj je unu kaj duono da metroj, kio tro karigus la tutan konstruaĵon.

Solvi la taskon helpas la nova sistemo de konstruado, ekpraktikita de 1903a jaro en Ameriko. Kiel konstrumaterialon ĝi uzas ŝtalon kaj betonajn brikojn; la lastaj, por plia malpezeco, estas farataj kun interna malplenaĵo. Tiuj konstrumaterialoj permesas fari la murojn duoble malpli dikaj. La konstruado mem estas plenumata jenmaniere:

Komence oni faras el betono fundamenton de la konstruaĵo. Tiu fundamento estas ĝenerale metata sufiĉe profunde de la ternivelo, iafoje eĉ, se la grundo estas sabloza aŭ argiloza, ilia profundo atingas ĝis 40 metroj kaj dependas de tio, kiom profunde kuŝas la firma, ŝtona subgrundo. Se la lasta kuŝas tro profunde, oni preparas artefaritan ŝtonan subgrundon — ordinare plataĵon el betono, dikan ĝis 60—70 centimetroj.

La fundamento mem konsistas el betonaj cilindroformaj kolonoj, nomataj "kesonoj", kies diametro atingas ĝis 2 metroj. Por prepari la kesonojn, oni fosas konformajn cilindroformajn putojn, ĉirkaŭante iliajn murojn per lignaj tabuloj, kunfiksataj per feraj ringoj. Tiuj putoj estas plenigataj per betono. Sur la kesonojn oni metas metalajn kolonojn (bild. 1), kiuj jam tenas la tutan konstruaĵon.

Kiam la fundamento estas preta, sur ĝi el ŝtalo oni konstruas ostaron de la domego, kvazaŭ ĝian ŝtalan skeleton. Necesaj por tio ŝtalaj kolonoj, balkoj kaj stangoj estas antaŭe preparataj en specialaj uzinoj kaj liverataj al la konstruloko en la stato tute preta por kunfikso.



Bildo 1. Muntado de la kesonoj. Dekstre — la fosata puto, maldekstre — la betonizita puto

La ŝtala ostaro de konstruaĵo faras ĝin sufiĉe elasta, iugrade fleksebleca, pro kio similaj konstruaĵoj pli bone rezistas kontraŭ tertremoj. Tion pruvis la tertremo en San-Francisco, kiam el ĉiuj konstruaĵoj plej bone konserviĝis nome la domegoj-gigantoj kun la ŝtala ostaro.

Samtempe kun muntado de la ŝtala ostaro estas farataj ĉiuj helpaj aranĝoj de la domego — liftoj, tubaroj por hejtado, akvokonduko, kontraŭincendia aranĝo, telefono, lumigado ktp., formantaj kune sufiĉe komplikan tub-reton.


Kiam ĉio ĉi estas farita, oni al la ŝtala ostaro de la domego aldonas ĝian karnon: la spacojn inter ŝtalaj stangoj kaj kolonoj oni plenigas per betonaj brikoj. Estas interese noti, ke iafoje oni finaranĝas la suprajn etaĝojn kaj finkonstruas la malsuprajn etaĝojn jam tiam, kiam la supraj estas okupitaj per diversaj oficejoj. Certe tion ne permesus la ordinara sistemo de konstruado.

Super konstruado de tiaj domegoj laboras ne iu aparta arkitekto, sed tuta stabo da inĝenieroj kun centoj da diversfakaj teknikistoj.

Iafoje, por malpli altaj domoj, la ostaro estas farata ne el ŝtalo, sed el ferbetono. Ferbetono estas ekpraktikita por la konstruarto multe pli frue, nome en 1867a jaro. Nun ĝi estas tre vaste aplikata kaj tial necesas diri pri ĝi kelkajn vortojn aparte. Ni jam citis kelkfoje en la artikolo betonon. Ĝi estas miksaĵo de cemento kaj sablo kun gruzo (dispecigitaj ŝtonoj). La cementon oni preparas el proporcia kvanto de kalko kaj argilo, kies miksaĵo estas metata sub la efikon de flamo ĉe temperaturo de 1400° C kaj poste muelata ĝis la stato de pulvoro. Miksita kun sablo kaj malsekigita per akvo, la cemento estas metebla en ajnan formujon, kiun ĝi perfekte plenigas; post kelkaj horoj ĝi komencas solidiĝi kaj en daŭro de kelkaj tagoj akceptas firmecon de ŝtono. Aldono de gruzo ankoraŭ pligrandigas la fortikecon. Tiamaniere do estas preparata la betono. Oni povas fari el ĝi diversajn partojn de konstruaĵoj — kolonojn, plafonon, balkojn, — uzante formujojn el ligno.

Sed laŭ sia rezisto betono ne multe diferencas de ŝtono kaj kiel tiu ĝi bone rezistas kontraŭ la kunpremantaj fortoj kaj tre malbone — kontraŭ la disŝirantaj fortoj. Sed en la konstruarto oni devas atenti ĉi ambaŭ fortojn; tion montras la bildo 2: iu forto *P* efikas sur la balkon, apogitan (samkiel en konstruaĵoj la plafonaj kaj plankaj balkoj) per siaj ekstremoj je du muroj. Sub tiu efiko la balko iom fleksiĝas, kiel montras la streketaj linioj, pli multe ĉe la mezo. Do, en la meza parto de la balko supraj ĝiaj tavoloj suferas kunpremon, kaj la malsupraj – disŝiron. Precipe klare tio estas videbla per iu primitiva eksperimento: se vi fleksigas freŝan arbobranĉeton, vi facile rimarkas ke la branĉo-ŝelo, sub efiko de disŝirantaj fortoj, disŝiriĝas sur la

Bildo 2




ekstera flanko de la fleksaĵo kaj, kontraŭe, kuntiriĝas, sub la efiko de kunpremantaj fortoj, ĉe la interna flanko.

Sekve, la konstrubalkoj devas rezisti ne nur kontraŭ kunpremantaj fortoj, sed ankaŭ kontraŭ la disŝirantaj. Tiun econ al la betonaj balkoj aldonas feraj stangoj, metataj dum pretigado de la balkoj en la mezon de la formujo tiamaniere, ke la stangoj estu interne de la betono. Tiamaniere oni ricevas perfektan konstrumaterialon — la ferbetonon. La granda avantaĝo de ferbetono estas ankaŭ tiu, ke al la konstruloko oni bezonas venigi ne la malfacile transporteblajn balkojn kaj kolonojn, sed la barelojn kun cemento, sablo ktp. kaj el la lastaj jam sur la loko mem prepari la ferbetonajn kolonojn kaj balkojn.

La bildo 3 montras konstruatan domegon ĝuste kun la ferbetona ostaro. El la supraj linioj, parolante pri la gigantaj domegoj, pri la famaj ĉielskrabantoj, ni povis lerni kelkajn elementajn konojn, certe nemultajn el la konstrutekniko. Sed laboristo, kiu en kapitalisma sociordo estas devigata ne nur kun peno akiri la panon, sed ankaŭ kun risko por sia vivo manĝi ĝin dum la ripoza horo, kiel montras la bildo metita frunte de la artikolo, — rajtas pripensi ankoraŭ ion multe valoran, pri kio rakontas la ĉielskrapantaj gigantoj.

Li rajtas pripensi, kiom da diversa materialo estas uzata por tiuj domegoj, ke necesas eĉ specialaj uzinoj, preparantaj la ŝtalan ostaron, krom la uzinoj kiuj preparas la ŝtalon mem, la cementon, la tubojn por akvokondukoj ktp., ĉiujn ceterajn partojn de la aranĝo, de liftoj komencante kaj per telefonoj finante, — kaj konkludi ke en konstruado de tiaj gigantoj partoprenas la ekonomio de la tuta lando.



Bildo 3. Fer-betona ostaro de konstruata domego

Se malgrandan lignan dometon povas konstrui unu sola homo, kiu mem hakas la arbojn, mem prilaboras el ili konstrulignaĵon kaj mem konstruas el ĝi la dometon, — do evoluo de la tekniko, ebliginte konstruadon de la gigantaj domegoj, necesigis partoprenon en ĝi de la tutlanda ekonomio.

La tekniko evoluas pluen kaj, certe, baldaŭ la enlanda ekonomio ne suficos por kontentigi ĝiajn kreskantajn bezonojn, ĝi postulos pli vastan agadkampon, ĝi postulos koordinon kaj partoprenon de la tutmonda ekonomio. Al tio metas la barojn kapitalismo kun sia divido de la mondo je apartaj ŝtatoj, konstruitaj sur la principo nacieca.

Evoluo de la tekniko necesigos la novan sociordon bazitan sur la principoj sennaciecaj.

Tion instruas al ni la gigantaj domegoj! Ili rakontas al ni, ke la ĉiel skrapantoj skrapas la ĉielon de l' kapitalismo.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

(Kelkaj konsideroj pri metodiko en la studado de prinaturaj kaj ekzaktaj sciencoj).

J. MILONOV

1. Scienco kiel Teknikilo.

Scienco servas al la homaro kiel organizilo de ĝia socia laboro. En la vivo de l' homa socio ĝi ludas la saman rolon, kiun en la funkciado de l' armeo plenumas kartoj de l' milita teatro kaj planoj de batalaj operacioj. Alivorte, scienco donas al la homoj la bildon de l' mondo kaj regulojn por ĝin reorganizi aplikante al la kontentigo de homaj bezonoj. Ĝi faras la laboron de l' socio pli celkonforma, pli produktiva kaj laŭplana: permesante al ĝi eviti nenecesan malŝparon de la energio.

Tekniko, laŭ sia enhavo, ampleksas la tutan sumon de l' laboraj rilatoj de la homa socio al la ĉirkaŭanta ĝin naturo. Tiuj rilatoj konsistas en tio, ke la homaro subigas al si la energiojn de l naturo, ĉiuflanke utiluzante ilin por priservi siajn multnombrajn bezonojn.

Kaj por tio ĝi bezonas koni — kiel estas formita kaj kiel vivas la naturo kaj aliflanke — per kiaj operacioj oni povas ekposedi ĝiajn potencajn, sed nekapteblajn fortojn.

La kartojn de la teatro de laboraj agoj kaj la planojn de laboroperacioj en la afero de la lukto kontraŭ la naturo por ĝin reorganizi havigas al la homaro matematikoj kaj prinaturaj sciencoj. Ili estas tre gravaj koniloj de la tekniko. Sen kono de tiuj sciencoj la moderna Socio ne povus ne nur starigi novajn teknikajn konstruaĵojn, sed eĉ ne sukcesus utiligi la jam pretajn atingaĵojn de l' pasintaj generacioj de la homaro.


Kiamaniere la matematikaj kaj prinaturaj sciencoj ludas la rolon de la instrumento en la tekniko — tion oni povas vidi el sekvanta fakta materialo.

En la procedo de l' laboro grandan signifon havas kvantaj kalkulaĵoj. Antaŭ ol komenci la laboron oni ordinare faras ĝian planon, konstruas imagatan modelon kaj preparas desegnaĵon. Tie ĉi al la laborontoj oni indikas necesajn mezurojn de la detaloj de l' konstruotaĵo, donas necesajn kvantajn rilatojn de ĝiaj ĉefaj elementoj. La lokon de antaŭkalkula instrumento en laborpraktiko de la socio okupas matematikaj sciencoj. Ili prezentas tutan arsenalon de la reguloj por kalkulo kaj planizo. La aritmetiko servas por simplaj teknikaj antaŭkalkuloj de vilaĝano kaj metiisto, samkiel por kalkuloj kaj komputoj de la meteorologo kaj agronomo. La Geometrio prezentas gravan instrumenton de l' Termezurado, maŝinkonstruado kaj konstrutekniko. La algebro jam servas por la plej komplikaj teknikaj kalkulaĵoj.

Fundamentaj prinaturaj sciencoj estas fiziko kaj kemio. Ili ambaŭ prezentas, necesajn helpilojn de l' inĝenierio.

L'unua liveras al la homoj indikajn rilate la metodojn de l' konstruado de maŝinoj por utiligado de la fortoj de l' pezo, akvo, vento, vaporo kaj elektro. Ĝi ankaŭ instruas — kiamaniere prepari instrumentojn por mezurado kaj reguligado de l' laboro de tiuj fortoj. Sur la kono de la kemio estas bazita terplibonigo, preparado de acidoj, de nutrivaĵoj kaj kuracaĵoj. Ĝi servas kiel konilo por metalfando, vitro- kaj farbo-produktado, ekonomizo de l' hejtaĵo.

Tiamaniere la tekniko estas por la scienco la kampo por aplikado. En tiu sfero la kono plenumas sian socian funkcion. Laŭ sia porviva signifo kaj destino la scienco estas instrumento de la tekniko. Sed krom tio inter ili ekzistas ankoraŭ dependo alispeca.



2. Tekniko estas fonto de scienco.

Scienco estas rezulto de la praktiko. Ĝi estas kombinaĵo de lecionoj, deduktitaj el viva kaj labora sperto de la socio. Ĝuste per tia vojo ordinare akiros konojn ĉiu aparta laboranto. Teknikaj reguloj, kiujn li ĉiutage utiluzas estas nenialio, ol lecionoj de pasintaj eraroj kaj sukcesoj. Estas vere, ke tiaj reguloj ne ĉiam estas deduktataj de li mem, sed ofte transdoniĝas al li en la jam preta formo de la pliaĝaj generacioj aŭ de aliu laboranto. Tamen tiu ĉi cirkonstanco neniom ŝanĝas la esencon de la problemo.

Tekniko servas kiel fonto ne nur por simplaj praktikaj reguloj kaj agmanieroj. Ĝi naskas ankaŭ profundajn teoriajn ĝeneraligojn de l' ekzaktaj kaj prinaturaj sciencoj. Preskaŭ ĉiuj plej gravaj teoriaj problemoj en tiuj sferoj de l' kono estis metitaj de la progreso de l' socitekniko. Kaj ĉiuj hipotezoj, kreitaj por solvi teoriajn taskojn de l scienco, estas same prenitaj el la sfero de l' teknika praktiko. Certe, en iuj kazoj la scienco naskiĝis el tekniko senpere, kaj en aliuj — ilin kunigis ti-aliuj interĉenoj. Sed ĉiuokaze ĝuste tekniko estis la faktoro de l' evoluo de la matematiko kaj natursciencoj.

Jen estas kelkaj faktoj, el kiuj estas videbla tiu rolo de tekniko.

En la sfero de l' matematiko sub influo de teknikaj bezonoj aperis p. e. la instruo pri konusaj sekcoj. Tiel p. e. grekaj geometroj nomis kurbojn de l' dua vico, t. e. parabolon, hiperbolon kaj elipson. Matematika studo de tiuj kurboj estis elvokita de sekvanta cirkonstanco.

Konstruado de diversgrandaj temploj, en kiuj altaroj estis kuboformaj pro konsideroj de religia karaktero, metis antaŭ la grekaj konstruistoj de la IV-a jarcento antaŭ nia ero teknikan problemon: duobligi la kubon. El la praktiko de majonado de similaj altaroj la masonistoj en krudaj formoj deduktis la kunrilaton inter la edroj de la donita kaj duobligita kubo. Baldaŭ eklaboris super matematika solvo de tiu problemo la grekaj geometroj. Hipokrato, la pedagogo el Hioso en V jarcento donis al la problemo sciencan bazon, reduktinte ĝin al la difino de l' unua el du mezaj proporciaĵoj inter la edro de certa kubo kaj la duoble pli granda linio. Tiamaniere li nur donis matematikan formoligon de la labora sperto de masonistoj, ne pli.

En tiuj tempoj geometriaj problemoj estis solvataj ne per kalkulado kaj mezurado, sed per desegnado kun helpo de cirkelo kaj liniilo. Kaj la geometriaj lokoj, ricevataj, se oni uzas la cititajn instrumentojn, la rektlinio kaj cirklo ne permesis desegni necesan proporcion, t. e. solvi la problemon pri duobligo de la kubo senriproĉe de teoria vidpunkto. Tio igis la grekajn geometrojn de la IV-a jarc. sin okupi pri serĉado de novaj geometriaj lokoj. En rezulto de longdaŭraj serĉadoj Meneihm malkovris la konusajn sekcojn.

Ellaborante sciencajn konceptojn de la evoluaj korpoj, ronda konuso kaj de konusaj sekcoj, la grekaj geometroj denove utiligadis la teknikan sperton de l' metiistoj. Tiuj konceptoj formiĝis ĉe la potistoj, kiuj uzis ĉe produktado de vazaro kiel stablon la turniĝantan cirklon. En la procedo de l' laboro de potisto okazis aldoni al prilaborata de li peco de malseka argilo la formon de l' konuso. Kaj kiam li fortranĉadis de ĝi partojn kaj pecojn, kiuj estis de teknika vidpunkto superfluaj, tiam sur la surfaco de sekco oni observadis kurbojn de ĉiuj tri specoj. Forminte la konceptojn de la konusaj sekcoj, la geometroj ree nur ĝeneraligis la laborajn perceptojn de l' metiistoj.

Parabolon kaj hiperbolon Meneihm aplikis por solvi la problemon pri duobligo de l' kubo. Li desegnadis certajn kurbojn, dislokante ilin unu rilate alian en difinita maniero. Kaj per tiu vojo li ricevadis la desegnaĵon de l' postulata proporcio. Aperinte sub influo de l' teknika tasko, la instruo pri la konusaj sekcoj servis siavice kiel malŝlosilo al ĝia solvo.

La cititaj tie ĉi faktoj ilustras, kiamaniere tekniko prezentas fonton por matematiko. Ĝia ligo kun natursciencoj estas videbla el la fakto de l' estiĝo de mekanika teorio de varmo.

La problemo pri interligo inter la varmo kaj laboro estis metita pro la granda aplikado por teknikaj bezonoj de l' vapormaŝino. Ja ĝuste dank' al varmo estiĝas laboro de vapormaŝino. Kaj en la unuaj dekjaroj de l' XIX-a jarcento vapormotoroj jam estis aplikataj en la ŝaktoj kaj ĉe teksfabrikoj. Tiutempe komenciĝis krome la uzado de vaporŝipoj kaj lokomotivoj. Tiamaniere la tasko — konstati la interligon de la varmo kaj laboro estis grava kaj aktuala teknika problemo.

Estas evidente, ke al maŝinistoj tiu interligo estis konata laŭ praktiko kaj en la mezuroj de iliaj praktikaj bezonoj. Sed en la unua kvarono de la jarcento pri ĝi ekinteresiĝis ankaŭ scienculoj. Tiel, franca militinĝeniero Sadi Carnot (Karno) elpaŝis kun la artikolo „Pri movanta forto de l' fajro". Tie, analizante la agadon de vapormaŝino, li science formulis tiujn kondiĉojn, ĉe kiuj la mekanika laboro povas esti farita kun helpo de varmo. Carnot eldiris la penson, ke inter la varmo kaj mekanika laboro ekzistas ligo, kiu dependas nek de la objekto varmohavanta, nek de aliaj cirkonstancoj. Li konstatis, ke la kvanto de l' varmo, kiu povas esti transformita de la maŝino en la laboron, dependas sole de la grando de l' temperaturfalo.

La ideo pri transiro de la laboro en la varmon estis esprimita ankoraŭ en la fino de l' XVIII-a ĵarcento de la angla militinĝeniero en germana servo Benjameno Thompson-Rumford. Observante la boradon de la kanonoj, li estis mirigita pro la granda altiĝo de l' temperaturo de la tubo, borilo kaj deboraĵoj. Vico da eksperimentoj, de li faritaj ĉe la sama arsenalo, kondukis lin al la konkludoj rilate al transformiĝo de la laboro en la varmon. Kaj en la 50-aj jaroj de l' XIX ĵarcento germanaj inĝeniero Gustav-Adolf Girn kaj instruisto de fiziko en artileria lernejo — Rudolf Clausius aranĝis vicon da eksperimentoj pri la vapormaŝino. Ili konstatis, ke la varmo kaj laboro estas ekvivalentaj.

Tiamaniere el la tekniko de maŝinproduktado elkreskis la moderna mekanika teorio de l' varmo.

La ambaŭ menciitaj tie ĉi faktoj ilustras kiel tekniko servos kiel fonto por la natursciencoj kaj matematiko. Kaj krome ĝi prezentas la bazon ne sole por praktikaj reguloj, sed ankaŭ por teoriaj ĝeneraligoj.



3. Abstrakta scienco — estas nur kompletigo de l' aplika kono.

Matematikaj kaj prinaturaj sciencoj estas instrumentoj, tre komplikaj laŭ sia strukturo. Ili prezentas tutan arsenalon da teknikaj reguloj. Tiujn regulojn oni ordinare aranĝas en harmonian sistemon, dismetas tiamaniere, ke oni povu pli facile memori ilin ĉiujn kune, kaj rapide trovi ĉiun el ili aparte por utiligo praktika. Tia sistemigo de lecionoj-reguloj portas la nomon "teoria prilaboro de l' kono". En tiu laboro la scienculo ne atentas, kiam, en kia teknikregiono kaj kiamaniere la homaro deduktis certajn teknikajn regulojn. Lin tute ne interesas, kie kaj kiel ili estas aplikataj de la homoj. Ĉefa tasko de l' scienculo estas atingi logikan purecon de ĝeneraligoj kaj precizecon de klasifikado. Tiu regiono ordinare portas la nomon de abstrakta (pura) scienco.

Certe **abstrakta** scienco havas grandegan signifon por afero de studado, instruado kaj esplorado. Ĝiaj materialoj helpas orientiĝi en la riĉa kaj diversforma arsenalo de sciencaj instrumentoj, samkiel la katalogo ebligas sinorienti en biblioteko. Kaj teoria prilaboro de l' kono ludas por praktika aplikado de l' scienco la saman rolon kiun en la praktiko de bibliotekarto plenumas la kreado de klasifiksistemo por libroj. Alivorte, la pura scienco ne povas esti apartigita de la scienco aplika. L' unua estas ne pli ol daŭrigo kaj kompletigo de la dua. Laŭ sia funkcio pura scienco estas ligita kun la aplika samkiel en la kutima laborilo la tenilo estas ligita kun la laborparto. Tiel, ekzemple estas ligita la hakiltenilo kun la hakilo.

Tiu ĉi paralelo povas ekŝajni unuavide tro kruda kaj ekskluzive ekstereca. Sed fakte ĝi malkovras profundan internan dependecon. Ja scienco, kiel tutaĵo estas la instrumento de l' socia praktiko. Kaj matematiko kun natursciencoj ludas rolon de l' teknikiloj. Ĝuste tiu speco de interligo inter pura kaj aplika scienco estas klare videbla ĉe la sekvanta fakto.

La fundamenta kerno de teoria biologio konsistas en la evoluteorio de specoj de Darwin kaj heredteorio de Mendel. La ambaŭ teorioj estas elementoj de pura scienco. Ili kunligas en unu logikan tutaĵon ĉiujn lecionojn, deduktitajn de homoj el la eksperimento de florkulturado kaj animalbredado, samkiel ricevitajn el la eksperimentado de lukto kontraŭ malsanoj. Pli ol tio; ili donas priskribon kaj klarigon de l' vivprocedoj, kiuj okazas en la tuta animalio kaj vegetalio.

Samtempe la ambaŭ teorioj formulas la leĝojn de l' evoluo ekster ĉiu dependeco de la praktikaj bezonoj de agrikulturo, brut-bredado kaj medicino. Ili donas al tiuj leĝoj pure logikan, abstrakte-teorian ekspozon (difinon).

Kaj intertempe ĝuste tiuj teorioj kuŝas en la bazo de l' praktika aplikado de biologio. Sur ili estas konstruitaj la reguloj, kiujn utiligas la homoj por plibonigi la specojn de l' cerealoj (gramenoj), legomoj, frukt-arbustoj kaj arboj. Dank' al ili la homo ricevis eblon kreskigi la specojn, plej bone kontentigantaj liajn bezonojn, p. e. nutro-beton de grandegaj mezuroj, malmolan tritikon, — sekan, pezan kaj amelozan, aŭ la pomojn „sensemajn". Ili permesas al la homoj fari admirindajn transformojn de hejmanimaloj, alkonformigante ilin al siaj bezonoj. En rezulto de aplikado de tiaj reguloj aperis p. e. diversaj rasoj da ĉevaloj: apud la rapidkuraj galopuloj — potencaj ŝarĝegportantoj. Fine la samaj teorioj donas al la homo, en la manojn la metodojn de lukto kontraŭ diversaj infektaj mal-sanoj. Sur ili estas bazita larĝe vastigita praktikado de antaŭgardaj vak-cinoj kaj aplikado de diversspecaj kuraciloj, helpantaj al la organismo venki la malsanigajn bakteriojn.

La teorioj de Darwin kaj Mendel estas nur la daŭrigo kaj kompletigo de ĉiuj ĉi agmanieroj kaj reguloj de aplika biologio.

La rolon de l' daŭrigo ili ludas tial, ke ili aperis kiel rezulto de la transportado sur la spontajn procedojn en la vivo de l' animalio kaj vege-talio de la metodoj, konscie aplikitaj en la animalbredado kaj agrikulturo. Estas vere, ke en tiuj regionoj la homo estis nur senkonscia lernanto de l' naturo.

Sed kompreni la leĝkonformecon de la specevoluo en la naturo la homoj povis nur per tio, ke ili pense vastigis sur ĝi la ellaboritajn de la daŭra praktiko skemojn.

Kaj kiel kompletigo de la agmanieroj kaj reguloj de aplika biologio tiuj du Teorioj servas ĉar kunligas ilin en la unuecan tutaĵon. Tia ligo permesas al lernanto pli facile kaj pli bone memori ĉiujn elementojn de la biologia grupo de sciencoj. Kaj tio ebligas al la praktikulo rapide kaj ĝuste sin orienti en komplikaj problemoj de l' agrikulturo, brutbredado kaj medi-cino. Tiamaniere la homoj atingas la ĝustan komprenon pri spontaj pro-cedoj de l' vivo en la naturo kaj povas utiligi kaj reguligi ilin konforme al siaj bezonoj. Sen la teorio pri evoluo de specoj kaj heredteorio, la moderna praktika biologio estas neebla samkiel estas nepensebla laboro de biblio-teko sen certa sistemo de libroklasifiko kaj sen katalogo, samkiel estas ne-ebla hakado de ligno sole per hakilo sen ĝia tenilo.

Tial pura kaj aplika sciencoj neniel povas anstataŭi unu la aliun. Ili nur kompletigas unu la aliun. Matematikaj kaj prinaturaj sciencoj, kiel tutaĵo, estas teknikilo. Tie-ĉi senpere laboranta parto estas metodoj kaj reguloj de aplika kono. Kaj teoriaj ĝeneraligoj elpaŝas nur en la rolo de necesa, koniga kompletigo. Tial kaj sole tiel oni devas ilin studi.



4. Laboratorio — kiel kompletigo de fabriko kaj uzino.

La sistemo de studado pri matematikaj kaj prinaturaj konoj en supera lernejo ĝis nun reduktiĝis al la anstataŭo de aplika scienco per scienco pura, aŭ renversa. Tiu fakto trovis sian esprimon kaj en lernplanoj kaj en lerna praktiko. Ordinare pura scienco estis studata apartigite de aplika kono en la periodo de ĝenerala matematik-prinatura klerigo, t. e. ĉe la unuaj kursoj de ĝeneralaj superlernejoj. Kaj ĝuste kontraŭa fenomeno okazis ĉe la transiro al teknika specialiĝo. Tiamaniere, la scienco kiel tutaĵo, kiel teknikilo, restis ekster la vidkampo de lernantaro. En iliaj prezentoj la organike-unuecaj partoj de l' kono: pura kaj aplika sciencoj figuris kiel du tute memstaraj regionoj. Kaj tial formiĝis du malvaste-specializitaj tipoj de sciencaj laboruloj! puraj teoriuloj kaj puraj teknik-uloj.

Tia sistemo de studado kun ĉiuj ĝiaj sekvoj bedaŭrende ne estas forvivita ĝis nun. Tamen la nova epoko postulas novan aliron. Laboristoj kiuj soifas konon, alportas kun si en la lernejon novajn ekkonajn bezonojn. Antaŭa lernantaro, kiu konsistis en sia grandega plimulto el reprezentantoj de intelektularo povis kompreni kaj akcepti la puran sciencon deŝirite for de teknika praktiko. Ĝi estis kondiĉita de tiu cirkonstanco, ke la intelektularo en sia agado operaciis precipe per la ideoj, elpaŝante en la rolo de ideologia organizanto de la vivo de malnova socio. Al ĝi estis proksimaj kaj konataj la abstraktaj skemoj de pura scienco kaj aplika kono prezentiĝis nur kiel duagrada aldono. Sed por la proletaro, kiu, kiel klaso, estas okupita per rekta laboro, teknikaj reguloj nature prezentiĝas kiel pli gravaj, pli proksimaj kaj kompreneblaj. El tio certe ne sekvas, ke li ne sentas bezonon pri teoriaj ĝeneraligoj.

Tamen puran sciencon li povas kompreni kaj akcepti nur en ĝia interligo kun aplika kono, nur kiel daŭrigon kaj kompletigon de tiu lasta. Kompreni natursciencon kaj matematikon en ilia tuto, kiel teknikilon — jen estas ekkona bezono de laborista junularo kiu sin tiras al scienco.

Tiu fakto postulas gravajn ŝanĝojn kiel en la sfero de lernoplanoj, tiel ankaŭ en la sfero de lerna praktiko de niaj lernejoj. Estas necese ŝanĝi la kutiman rilaton inter pura kaj aplika scienco. Ĝis nun ili anstataŭis unu la aliun, kaj oni devas starigi la kompletigan interrilaton. La loko por studi puran sciencon — estas laboratorio, dum la aplika kono estas plej bone obtenebla en fabriko kaj uzino. La laboro en laboratorio, ĉu fizika, kemia, matematika ĉu iu alia reduktiĝas al la solvado de abstraktaj taskoj, konstruitaj en apliko al bezonoj de abstrakta studado.

Oni tie ĉi aplikas speciale konstruitajn instrumentojn, ordinare ne uzatajn en teknika praktiko. Laboratorio, kiu esence estas daŭrigo kaj kompletigo de fabriko kaj uzino, en niaj lernejoj anstataŭas kaj malklarigas ilin. Solvante en laboratorio siajn taskojn la studento ordinare ne havas komprenon pri ilia teknika bazo kaj aplikoj. Tio akre kontraŭdiras la ekkonajn bezonojn de laborista lernanta junularo. La ekzistanta aferstato estas ŝanĝenda. Laboratorioj en niaj lernejoj devas esti nur kompletigo por fabriko kaj uzino.

Jen kelkaj konkretaj ekzemploj — kiel oni devas solvi tiun jam maturiĝintan taskon.

En praktikaj laboroj por ĝenerala fiziko la studento p. e. sin okupas per difinado de rezistoj por bobenoj de kupra kondukilo. Ĉi tie li uzas la metodon de t. nom. "ponteto de Witston". Tia laboro celas per eksperimenta vojo konatigi studenton kun du gravaj leĝoj de elektrodinamiko: la leĝo de Omo kaj la leĝo de Kirchgof. Krome, ĝia tasko estas instrui utiligadon de tiuj leĝoj teorie. Teknika aplikado de la "ponteto" restas en tia sistemo tute ekster atento de la lernanto. Kaj tamen ili estas sufiĉe multnombraj. Kun helpo de Witston-metodo oni testas (elprovas) izolecon de la reto, eltrovas la lokojn de l' difekto en kondukiloj kaj kabloj, difinos la kapaciton de kondensiloj kaj mezuras la koeficienton de aŭtoindukto. Prilaboro de ĉiuj ĉi teknikaj aplikoj de la "ponteto" povas esti aranĝita sen peno en la lerneja laboratorio. Kaj tia teknika tendenco estas jam la paŝo antaŭen al la solvo de la metita problemo.


En ekzercado, p. e., pri analiza geometrio studento solvas taskojn ligitajn kun la manieroj de desegnado kaj la ecoj de la, ni diru, parabolo.

Tiukaze li procedas kun la parabolo sole kiel geometria loko de punktoj. Kaj la taskoj estas komponataj ordinare tiamaniere, ke ili nur elmontras la abstraktajn ecojn de certa kurbo. Teknikaj aplikoj de la parabolo en ili ne trovas sian reflekton. Kaj intertempe tiu ĉi kurbo estas larĝe aplikata en teknikaj antaŭkalkuloj. Antaŭ ĉio ĝi servas por grafika bildo

de diversspecaj procedoj el regiono de tekniko. Tiel, ekz. per parabolo oni esprimas eksteran karakterizon (ŝanĝo-kurbo de la tensio ĉe la kontaktiloj depende de la ŝarĝo) de certaj dinamo-maŝinoj. Kun helpo de ekvacio de parabolo oni kalkuldifinas trajektorion (aeran vojon) de artileria grenado), linion de elasto por certaj traboj en konstruarto.

Tiu kurbo estas uzata en la konturoj de laŭlongaj profiloj de traboj. Laŭ la profilo de parabolo oni akrigas la platajn kaj kombinitajn risortojn, kiuj laboras por fleksrezisto ktp. Ĉiuj ĉi teknikaj aplikoj de certa kurbo povas kaj devas esti prilaboritaj dum ekzercadoj en analiza geometrio. Tia prilaboro akcelos al proksimiĝo de pura scienco kun la aplika, proksimiĝo de la laboratorio kun la fabriko kaj uzino.

En la vivo de nia lernejo laboratorio devas ne anstataŭi la fabrikon kaj uzinon, sed nur kompletigi ilin. Tion postulas objektiva rolo de la scienco kiel kreitaĵo kaj ilo de la tekniko. Tion postulas ankaŭ ekkonaj postuloj de laborista studentaro. En tiu direkto oni devas komenci aliformigon de niaj lernoplanoj kaj de nia instrua praktiko. *Elrusigis S. H.*



Niaj specialtemaj numeroj estis provo rompi tiun sistemon kaj enporti al ĝi la elementojn de planeco; ili estis la provoj eksperimenti metodojn proprajn al la socialisma sistemo, nome la metodojn de laŭplana laboro. Fiksante la ĝeneralan temon por iu numero, ni koncentrigas la atenton de l' kunlaborantoj ĉirkaŭ tiu ĉefa temo, lasante al ili tamen la vastan iniciaton en la elektado de suĵetoj por originalaj rakontoj kaj de fragmentoj por tradukado.

Enportante tiamaniere al nia literatura laboro elementojn de planeco, ni havis sukceson; niaj specialtemaj numeroj kaj ilia sukceso atestas, ke tiu sistemo estas vivkapabla, ke, sekve, la elementoj de socialismo estas bone praktikeblaj en nia SAT-kolektivo.

Al tiu konkludo nin venigas la sperto. Kaj tial ŝajnas al ni, estas eble kaj jam necesas pligrandigi ĉi elementon de planeco en nia revuo. Ni provu do pli ofte aperigi la specialtemajn numerojn. Legantoj estas petataj helpi al ni, proponante temojn por tiaj numeroj. Dume, al la jam anoncitaj temoj — la virina (por marta numero) kaj la junulara (por septembra numero) ni aldonas ankoraŭ unu, por la maja numero — la temon pri la unuamaja laborista festo. Tiu festo estas vere tutmonda kaj literaturo en ĉiuj landoj certe enhavas juvelojn tiutemajn. Ni do kolektu tiujn juvelojn por prezenti ilin en nia maja kajero, kiel kvazaŭ unuamajan krestomatieton de SAT-anaro. En ĉiuj landoj, en ĉiuj sektoroj SAT-anoj elektu materialon por tiu numero, ke ĝi estu vere tutmonda kaj vere sennacieca, kiel sennacieca estas la unuamaja festo mem.

La julian numeron, kiel kutime ni rezervos por la originalaj verkaĵoj; ĝi estos kvazaŭ nia ekzamena laboro antaŭ la kongreso, ni preparu por ĝi la bonajn kaj belajn paĝojn, atestontajn pri nia senĉesa maturiĝo.

Ni refoje memorigas al la redakcioj de ĉiuj esperantaj kaj esperantemaj gazetoj, dezirantaj ricevadi "Sennaciecan Revuon" interŝanĝe kontraŭ siaj eldonaĵoj, ke ili devas direkti ĉiujn presaĵojn senpere laŭ la redakcia adreso de "S. R." — *Moskvo* (USSR.) 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5.

Ni kun miro konstatas, ke kelkaj el la gazetoj esperantistaj, regule ricevantaj nian revuon kaj eĉ notantaj tiun en sia bibliografa fako, ne bonvolas sendi al ni la interŝanĝajn ekzemplerojn de siaj eldonaĵoj. Ĉu tio estas intence farata kaj ni devas taksi tion kiel apartan specon de la "neŭtraleco"?

Sapienti sat!

La Redakcio.

ĈIU ESPERANTOPAROLANTA LABORISTO
LEGAS LA UNUAN SEMAJNAN
LABORISTAN GAZETON EN ESPERANTO

"SENNACIULO"

POSTULU PROVNUMERON ĈE
ADMINISTRACIO DE S. A. T.
LEIPZIG-STÖTTERITZ, COLMSTRASSE 1

Jarabono al "Sennacieca Revuo"

Argentino 3 pesos; Aŭstrio 5 ŝil.; Belgio 15 fr.; Brazilio 7 milr.; Britio 60 penc.; Bulgario 100 lev.; Ĉekoslovakio 25 kr.; Danio 4 kr.; Estonio 300 mk.; Finnlando 30 mk.; Francio 15 fr.; Germanio 3 mk. or.; Hispanio 6 peset.; Hungario 3 or. kr.; Italio 20 lir.; Japanio 2 jen.; Jugoslavio 50 din.; Latvio 4 lat.; Litovio 7 lid.; Nederlando 3 guld.; Norvegio 5 kr.; Polio 4 zlot.; Portugalio 15 esk.; Rumanio 150 lej.; Sovet-Unio 1,50 rubl.; Svedio 3 kr.; Svisio 5 fr.; Usono 1,50 dol.

ABONU ĈE ADMINISTRACIO:
RICHARD LERCHNER
LEIPZIG-STÖTT., COLMSTR. 1 (GERM.)
poŝtĉeka n-o 6835

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)